Back of the heroic, self-sacrificing labors of the three full-time workers in the Central Office, it is your efforts on behalf of Esperanto that have made these accomplishments possible. More new members come directly and indirectly from the efforts of present members than from any other source. Your contributions to the *Sustaining Fund* have kept things going, and again have enabled this Committee to interest outside assistance. Many of your suggestions have been acted upon and are showing results. Continued cooperation and enthusiasm like this, and Esperanto will make a real dent in American thinking.

Coming next year? – a real test for Esperanto in America. One of our members has figured out that if you loyally support the necessary, moderate increase in membership dues, if the trend in membership growth continues, if contributions to the *Sustaining Fund* are maintained, and if there are no increased expenses, we can become self-sustaining from membership dues alone in five years. In fact, the picture is really better than that because the surpluses of the last 2½ years will absorb the de-

(continued on page 40)

KANADA INFORMO

"Credit Men's Journal", gazeto de komercistoj en Kanado, publikigis longan, interesan, 3-paĝan raporton pri Esperanto en la Marta numero. La artikolo estis skribita de *Norman Fyffe*, nova membro de EANA.

S-ro Oleg Telizyn, studento en la Seminario de Sankta Francisko, Ontario, interesigas aliajn studentojn pri la interlingvo. Antaŭnelonge, ni ricevis bonan leteron tute en Esperanto de kunulo lia, *Paŭlo Labelle*. S-ro Labelle baldaŭ revenos al sia hejmo en Montreal, kie li intencas aktive labori por nia movado.

Douglas Scott, nova Esperantisto kaj membro de la Subtena Komitato de EANA, skribis pri sia lernado de Esperanto jene: "Esperanto estas mirinda. Estis eble por mi lerni ĝin sufiĉe por kompreni ion ajn skribitan Esperante post nur tri tagoj de ne tro koncentrita studado".

D-ro P. L. Pratley el Montreal raportas, ke li ĵus revenis de transkontinenta vojaĝo, dum kiu li vizitis ĉe la Esperanto-Klubo en Vancouver, B.C. Kelkaj membroj de la tiea grupo intencas vojaĝi al la Kongreso de EANA en Sacramento, Kalifornio.

Miriam kaj Gustav Carlson, Vancouver, sendas raportojn de tempo al tempo pri la kunvenoj en tiu bela urbo. La grupo kunvenas en la hejmoj de la membroj por ekzerci Esperante, kaj distras sin per Esperanto-kartludado, ktp. Kutime la kunveno finiĝas per bona kafotrinkado kaj multe da manĝaĵoj. Estas ĝoja afero esti Esperantisto en Vancouver!

GRENERO AL GRENERO FARIĜAS GRANDA AFERO

Kontribuoj al la Subtena Kaso de EANA: Ni kore dankas la sekvantajn membrojn pro iliaj donacoj, ricevitaj depon la eldono de la Marto-Aprila numero de AE: *D. Kuzyk* (\$1), *M. Chrenka* (\$1.55), *Isabel Snelgrove* (\$2), *J. R. Wheeling* (\$5), *B. Van Hill*, *William Lesowski*.

"Amerika Esperantisto" en Publikaj Bibliotekoj: Al sekvantaj membroj ni ŝuldas grandan dankon pro iliaj malavaraj donacabonoj de AE por Publikaj Bibliotekoj: *H. W. Smart* (10), *Esperanto-Societo de Detroit* (10), *Esperanto-Kurso en Philadelphia* (4).

Sukcesojn en la kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron" ni raportas por la sekvantaj: *Richard Vineski* (2), *Elsie Yungbans* (2), *Donald Walton* (1), *Bradley Fleener* (1), *David Therrien* (1), *W. Vathis* (4), *Ted Stewart* (1), *J. McNaughton* (1). Koran gratulon kaj dankon!



Kiuj estis la unuaj Komunistoj? Iu diris al ni, ke estis Adamo kaj Evo! Ĉar ili ne havis domon, ili ne havis vestaĵojn, kaj ili havis nur unu pomon por dividi inter si por manĝi, - tamen oni nomas tian specon de vivo **PARADIZO!**

PRI VERSFARADO EN ESPERANTO

Montagu C. Butler

(Ĉi tio estas la dua kaj fina parto de la artikolo.)

PRI KANTTRADUKO, se vi ne estas iugrade kaj poeto kaj muzikisto, ne traduku kanton. Antaŭ ol komenci, lerni la arion parkere. La traduko sekvu la originalon ritme, kaj (se eble) sammaniere rimu.

La akcentataj vortoj koincidu kun la muzikaj. "Unu tagon en Polujo Zamenhof naskiĝis" estas linio akceptebla. Sed kantite (laŭ la konsilo de la Franca aŭtoro) laŭ la ario "The British Grenadiers" ĝi fariĝus "Unu tagon en Polujo Zamenhof naskiĝis" – rezulto ridinda kaj nekomprenebla. Ho ve! Kiom da kantaroj—eĉ kiom da gramofondiskoj—enhavas similajn misakcentojn, kiuj ŝokas la orelon!

Vorto aŭ frazero ripetita en la kanto (ekz., ĉe solo oratoria) estu ripetebla en la traduko. Kiel ekzemplon, prenu la jenan poemon de Heine.

Du bist wie eine Blume,
So schön, so rein, und hold –
Ich schau' dich an, und Wehmuth
Schleicht mir in's Herz hinein.
Mir ist als ob ich die Hände
Auf's Haupt dir legen sollt,
Betend dass Gott dich erhalte,
So schön, so rein, und hold.

Vi estas bela, pura,
Kaj ĉarma, kiel flor' –
Vidante vin, sopiron
Mi sentas en la kor'.
Kun mano sur via kapo
Mi preĝas al ĉiel':
Dio vin gardu konstante
En ĉarmo, puro, bel'.

Zorgu, ke la vortoj ebligu spiron laŭ bezono. Ĉe alta noto metu la vokalon *a* aŭ *o*: evitu *u* kaj *i*. Tio estas grava ĉie, sed precipe ĉe la fino de kanto. La reputacio de Esperanto kiel lingvo muzika dependas de la jeno: ĉu vi ebligas al la kantisto fari orelkrevan blekegadon ĉe la antaŭlasta noto (tiu alta noto, por kiu li konservas tutan forton kaj plenan pulmon)? Se li devos tie kanti *jam*, li sukcesos kriegi sen voĉrompiĝo kaj diros, ke Esperanto estas bela lingvo por kantado. Se vi metos *nun*, li malsukcesos, kaj malbenos nian lingvon. Eĉ estas konsilinde, traduki unue la lastan linion de kanto, por certiĝi, ke tiu punkto estas en ordo.

SPECIMENAJ RITMOJ

Jen diversaj specimenaj ritmoj por via komparo. Ni komencu per poemo ŝerce verkita kun linioj nur

unusilabaj!

Nun	Ha!	se	Kuŝ!	"Vi,	Plil!	Vin!	Ek!	He,	Jen
dum	la	ne,		mi –	ĝis	Ĝin!		vi!	li,
lun-	du!		Buŝ-	ni!	tri!		Dek!		sen
lum'	Ja!	kaj	tuŝ!			Ŝmac!		Ne!	ŝi!
		for		Ci!"	Du		Cent!		
kun	Pa!	ŝi,	Am!		plu!	Aĉ!		Fil!	Ho,
li,	Ba!	aj!		Kis!			Pek!		ve!
		por	Jam		Min	Ĉu		Ho,	do,
ŝil	Nu,	li!	flam!	Bis!	kvin!	plu?	Pen!	tro!	tre!

du silaboj

Hela	Bela	Via	Dia	Por vi,	Por mi,
Suno,	Luno!	Veno,	Benol!	Sufer'.	Mizer'.

tri silaboj

Sed kion,	Por ĉion	Estos mi	Jesos vi
Do, fari,	Ripari?	Malgaja, ĝis	Per dolĉa kis'.

kvar silaboj

Ĉu anĝelo
El ĉielo
Venis nun al tero nia?
Diru, kiu
Estas tiu
Kun la voĉo tiel dia?

Ah! fraŭlino,
Amatino!
Ĉu ne sentas vi komprenon?
Se vi provus,
Vi ja trovus
Tre facila la divenon!

kvin silaboj

Ĝi, grandegulo
Brava belulo,
Laŭte krakante,
Kvazaŭ mokante,
Staras fortike!

Sed homo venas –
Kverko eksvenas,
Kaj kun humilo
Ĝi sub hakilo
Mortas kaj falas!

Tiel, kun forto
De nia sorto,
Neelpetebla,
Neforbatebla,
Ni ne batalas!

ses silaboj

Lin mi serĉas ĉie,
Longe, senrezulte, en
Oraj ĉambroj, florgarden'!
Trovas lin nenie!

La vintro kaj luno,
Somero kaj suno
Printempo, aŭtuno,
Devenas de li.

Ame sopiris li,
Tamen foriris li,
Flame rediris mi
"Ne plu revenu!"

sep silaboj

Jen! Aprilo venas nun!
Kantas ĉiu koro!
Brilas la matena sun',
Dancas ĉiu floro!

Ĝoju, do, malgaja kor'
En la lumo hela;
Jam la vintro pasis for –
Ĉio estas bela!

ok silaboj

Ĉarme sonas ama kanto,
Movas sin lulilo,
Dolĉe kantas la patrino
Al malgranda filo.

Kie montaj agloj nestas,
Kia ajn vetero estas,
Ni du solaj kune restas,
Mia fil'.

naŭ silaboj

En sonĝo mi bone parolas
La lingvon, sen ia eraro;
Dirante, ja, kion mi volas,
Kaj tute sen help' de vortaro.

Junulo en urbo Tifliso
Salutis fraŭlinon per kiso!
Unue, ŝi miris:
Sed poste ŝi diris
"Mi havas la tempon por biso".



65 JAROJ — 35 JAROJ

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

ANTAŬ 65 jaroj aperis en Varsovio modesta 40-paĝa libreto: *Dr. Esperanto, Mejdunarodnij Jazik, Predislovie i Polnij Uĉebnik por Rusoj* (Doktoro Esperanto, Internacia Lingvo, Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro por Rusoj). La frazo "por rusoj" estis presita sur la titolo-paĝo en Esperanto. Kiel ĉiu libro publikigita en Rusujo tiutempe, la "Unua Libro" surhavis la daton, en kiu la cenzuro permesis la presadon: la 21-an de Majo 1887. Fakte la libro aperis la 14-an de Julio.

Antaŭ 35 jaroj, la 14-an de Aprilo 1917, en la sama urbo Varsovio, tiam okupita de la germana armeo, mortis D-ro L. L. Zamenhof, 30 jarojn post publikigo de la Unua Libro sub la pseŭdonimo "D-ro Esperanto".

La du datrevenoj sendube meritas la atenton de ĉiu Esperantisto.

La Unua Libro aperis en rusa lingvo en Julio 1887, en pola en Aŭgusto, en franca en Oktobro, en germana en Novembro. La angla kaj la dua rusa eldonoj aperis en 1888. Ekzempleroj nun estas tre maloftaj, sed feliĉe ekzistas fotofaksimilo en rusa lingvo (kun traduko en Esperanto) publikigita en Helsinki en 1948 (havebla de EANA; prezo \$2.50).

La Antaŭparolo iras de paĝo 3 al paĝo 30, la Plena Lernolibro de paĝo 35 al paĝo 40. Kvar paĝoj inter la du partoj estas plenigitaj per 8 subskribokartoj kun jena teksto: "Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis tian saman promeson. Subskribo: ... Adreso: ..." (Mi apenaŭ bezonas klarigi, ke en la nuna Esperanto oni dirus *subskribinta, montrite, kaj dek milionoj da personoj.*)

D-ro Zamenhof urĝe rekomendis, ke oni sendu al li kiel eble plej multajn subskribojn. Li aldonis: "Tiu, kiu havas principe ion kontraŭ lingvo internacia, alsendu la diritan blanketon kun trastrekita teksto kaj kun surskribo *kontraŭ*. De alia parto tiuj, kiuj ekdezirus lerni la lingvon en ĉiu okazo, sendeinde de la nombro de l'alsenditaj promesoj, trastreku la duan parton de la teksto kaj anstataŭ ĝin per surskribo: *senkondiĉe*". La "senkondiĉuloj" (vorto uzita de Zamenhof mem) fakte estis la unuaj membroj de la Esperanto-movado. Iliaj nomoj konsistigis la unuan materialon por la famaj "adresaroj" de D-ro Zamenhof.

La Antaŭparolo enhavis 6 modelojn de Esperanto: 3 tradukojn kaj 3 originalaĵojn. La tradukoj estis: la preĝo *Patro Nia*, traduko *El la Biblio* (la unuaj 9½ versoj de la libro Genezo) kaj poemo de la germana poeto Heinrich Heine (*En sonĝo princinon mi vidis*). La originalaĵoj estis: *Letero* (pri la internacia lingvo) kaj poemoj *Mia penso* kaj *Ho, mia kor'*.

La elekto de tiuj ekzemploj montras la literaturan inklinon de Zamenhof. Ĝi ankaŭ aperas el la argumentoj, kiujn li prezentas por la neceseco de internacia lingvo. Ĝenerale (eble pro la rusa cenzuro) la argumentoj en la Antaŭparolo al la Unua Libro estas iomete nebulaj. Sed kiam Zamenhof parolas pri literaturo, li faras tion tre konkrete: "Ĉe ekzistado de lingvo internacia ĉiuj tradukoj estus farataj nur en tiun ĉi lastan, kiel neŭtralan, al ĉiuj kompreneblan, kaj la verkoj, kiuj havas karakteron internacian, estus eble skribataj rekte en ĝi. Falus la ĥinaj muroj inter la

homaj literaturoj; la literaturaj produktoj de aliaj popoloj fariĝus por ni tiel same atingeblaj kiel la verkoj de nia propra popolo; la legataĵo fariĝus komuna por ĉiuj homoj, kaj kune kun ĝi ankaŭ la edukado, idealoj, konvinkoj, celado, — kaj la popoloj interproksimiĝus kiel unu familio”.

La insisto pri la literatura aspekto de la problemoj kaj la ŝajna ignoro de aliaj sferoj, en kiuj la neceseco de internacia lingvo estis multe pli urĝa kaj evidenta, estas klarigebla el la tiama politika situacio en Rusujo. La cenzuro estis treege severa. Rimarkoj pri politiko, registaroj, kondiĉoj en aliaj landoj, sociaj problemoj ktp. estis “danĝeraj”. Ĉiuj novaj ideoj — kaj multaj malnovaj — devis kaŝi sin en literaturo kaj poezio. La rusa literaturo de la 19-a jarcento, kun la famkonataj romanoj kaj poemoj de Tolstoj, Dostojevski, Lermontov, Turĝenev, estis grandparte rifuĝejo de ideoj, kiuj pro la aŭtokrata reĝimo ne povis esprimiĝi en la publika vivo kaj en la gazetaro de Rusujo.

Publikigante la Unuan Libron en 1887, D-ro Zamenhof sciis, ke la iniciato por uzo de Esperanto en internaciaj organizoj kaj konferencoj devos veni el ekster Rusujo. Tial li speciale ĝojis, kiam post apero de la franca eldono de la Unua Libro la Amerika Filozofia Societo en Philadelphia esprimis intereson pri Esperanto kaj kiam poste en Parizo, eminentuloj diversfakaj aktive eniris la movadon. Tio okazis nur post proksimume 15 jaroj. Por la lingvo mem sendube estis tre bone, ke dum ĝia unua eksperimenta periodo idealistoj diversnaciaj en Rusujo estis la pioniroj kaj donis al Esperanto grandan flekseblecon kaj propran elegantan stilon per literaturaj verkoj tradukitaj kaj originalaj.

Aldonita al la Unua Libro estis grandformata dupaĝa folio surpresita en 9 kolonoj ambaŭflanke. Ĉi tiu “internacia-rusa vortaro” enhavis 917 radikojn de vortoj kaj vortelementoj (gramatikaj finaĵoj, prefiksoj, sufiksoj). Tiun folion oni disdonis kaj disvendis ankaŭ aparte. En la unua periodo de Esperanto ĝi estis uzata en simila maniero kiel la postaj “ŝlosiloj”.

Per la Unua Libro komenciĝis la disvastigo de Esperanto, kelkfoje rapida kelkfoje malrapida, kaj la enkonduko de la lingvo en la praktikan vivon. Por Zamenhof mem la lingvo estis ilo ne nur de interhoma kompreno, sed ankaŭ de tutmonda harmonio kaj paco. En 1914, kiam li kaj multaj aliaj Esperantistoj estis survoje al Parizo, kie la Deka Universala Kongreso de Esperanto promesis fariĝi la plej brila kaj grandioza el ĉiuj, eksplodis la Mondmilito, alportante al li izolatecon, suferadon kaj malĝojon. La lasta grava artikolo, kiun li verkis, estis “Alvoko al la Diplomatoj”, en kiu li diris:

“Sinjoroj diplomatoj! Post la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi paco. . . Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo por atingi tian paco estis: forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭ-civilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.”

Tiu alvoko ankoraŭ estas prava. Estas melankolia devo memori, ke mallibereco ankoraŭ regas en multaj landoj de la mondo kaj ke ĝi ekzistas ankaŭ en Varsovio, kie D-ro L. L. Zamenhof eldonis la Unuan Libron de Esperanto antaŭ 65 jaroj kaj kie li mortis antaŭ 35 jaroj.

ESPERANTO-KRONIKO

Grava tutlanda radio-programo "The Big Show", la 20an de Aprilo, prezentis novan "kanton pri libereco". La vorto "libereco" aperis en ĝi en multaj lingvoj, inter ili Esperanto. Esperanto estis menciata. La programon disaŭdigis preskaŭ 200 radio-stacioj.

Esperanto-provleciono laŭ la Cseh-metodo estis parto de la monata kunveno de loka grupo de *International Platform Association* (profesia asocio de prelegistoj kaj artistoj) en New York la 18an de Aprilo. La lecionon prezentis Gesinjoroj G. Alan Connor en Town Hall Club. D-ro William Solzbacher prezidis la kunvenon. Inter la ĉeestantoj troviĝis diversaj eminentuloj.

Pri ukraina historio kaj literaturo interese prelegis S-ro Myron Mychajliw en la Literatura kaj Praktika Esperanto-Grupo en New York la 19an de Aprilo. Dum la sekvanta kunveno, la 3an de Majo, prelegis D-ro John Mish pri pola literaturo, kiu estas bone reprezentita en Esperanto per multaj interesaj libroj.

S-ro Donald Munro, de Pennsylvania, sukcesis enmeti leteron pri Esperanto en lokan gazeton. *Jack Sher*, direktoro de la Juda Centro en Easton, Pa., vidis la leteron, kaj tuj telefonis al la Centra Oficejo de EANA por havigi al si prelegon pri Esperanto. Kaj do, du semajnojn post apero de la unua letero de S-ro Munro, okazis en Easton sukcesa demonstracio de Esperanto prezentita de Ges-roj Connor. Rezulte de tio aperis en la ĵurnalo *Easton Daily Express* diversaj mencioj pri Esperanto, redaktista artikolo, kaj speciala du-kolona artikolo de bone konata loka ĵurnalisto, *Ben Kizer*. Tiel disvastiĝas la scio pri Esperanto pere de unu malgranda "Letero al Redaktoro". Ĉu vi jam skribis almenaŭ unu leteron al via loka ĵurnalo? Se ne, faru tion tuj! (Ne forgesu mencii nomon de EANA.)

En Philadelphia, Pa., S-ro A. I. Rogus organizis novan Esperanto-kurson por personoj de pola deveno. Kunhelpas en la grupo J. Trytiak kaj A. Chmielewicz. Kunvenloko estas domo de loka pola asocio.

Aktive laboras la Esperanto-grupo en Newark, N.J., por disvastigi Esperanton. Dividinte la laboron inter *Don Walton*, *Henry Kruse, Jr.*, *Elsie Yungbans* kaj *Dorothy McCusker*, la grupo gvidis novan kurson en vespera lernejo. En Aprilo, la gemembroj okazigis ekspozicion de Esperanto en kunveno de la tutŝtata asocio por edukado de plenkreskuloj.

El "la plej norda poŝtadreso en la mondo" skribis *Bradley Fleener* por rakonti pri sia propaganda laboro tie proksime al la norda poluso. Kvankam li deĵoras en sia posteno sep tagojn po sep horoj, li jam sukcesis konvinki alian nord-polusanon, J. *Rush Snyder*, fariĝi membro de EANA.

Ni bedaŭras anonci la morton de *Frank Lisle Horne*, longtempa Esperantisto kaj membro de EANA. Dum la lastaj jaroj li loĝis en la sanigejo "St. Helena" en Sanitarium, Kalifornio, kie li partoprenis ofte la kunvenojn de la tiea grupo. — Ĵus atingis nin la informo, ke en Majo mortis F. A. Post, pioniro de Esperanto. S-ro Post naskiĝis en Rusujo en 1872. Li venis al Usono antaŭ 46 jaroj.

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Argentino.* Edelma O. Palma, Alberdi 217, Jumin (F.C.N.G.S.M.). Deziras korespondi kun Esperantistino en Usono.
- Egiptujo.* Isaac Nassif, P.O. Box 350, Cairo. Egipta junulo intencas veni Amerikon por studado. Ŝatus konatiĝi kun Usonanino de 25 ĝis 30 jaroj por edziĝcelo. Sendu foton.
- Hispanujo.* Miguel M. Astrain, San Jorge 19, Zaragoza. Deziras korespondi kun geamerikanoj. Certe respondos.
- Japanujo.* S-ro Hedezi Mizuno, Saita, Naruto. 18-jara, deziras korespondi.
- Japanujo.* Junuloj en sanigejoj deziras korespondi. Jenaj adresoj:
 Tecuro Muraoka, Fukujuen, Koga-Maĉi Kasuĵa-Gun, Fukuoka-Ken. 20-j.
 Kin-iĉi Sahara, Tenryuso, Hutamata, Sizuoka-ken, 25-j. Kun Usonanoj.
 Matutaro Ōnisi, Sanatorio Syunkaen, Sanda, Hyōgo-ken. 39-j. oficisto.
- Kanado.* Douglas Scott, 50 South St., W., Dundas, Ont. 25-jara studento pri leĝo, deziras korespondi pri leĝo, juro kaj internaciaj aferoj.
- Usono.* F-ino Fay Varisco, 39-40 65 St., Woodside, N.Y. 30-jara fraŭlino deziras korespondi kun geesperantistoj tutmonde.



LA MIRINDA BILDO

La bildo supre estas vere interesa kaj mirinda bildo. Montrite klare en la bildo estas la figuro de Jesuo Kristo. *Sed*, ne ĉiu persono povas je unuavido trovi tiun figuron!

La bildo entenas la kapon de la Kristo, de la supra parto de la vizaĝo ĝis la ŝultroj kaj brusto. La figuro de Jesuo Kristo estas sufiĉe granda kaj okupas la plej grandan parton de la bildo. Ĉu *vi* povas vidi la figuron?

(Bildo represita el *Ames Information Booklet*, privata gazeteto de nia membro N. W. Ames, Mt. View, Kalifornio. S-ro Ames ofte enmetas artikoletojn pri Esperanto kaj en Esperanto en sian gazeton.)

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

- PRACTICAL ESPERANTO**, *Dr. Wm. Benson*. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated..... \$.25
- REED'S PRACTICAL GRAMMAR**, *Dr. Ivy K. Reed*. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price..... .35
- ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE**, *Connor-Solzbacher-Kao*. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....*Paper \$1.50; Cloth* 3.00
- UNIVERSALA ESPERANTO-METODO**, *Dr. Benson*. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....*Cloth* 6.00
- ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY**, *Cox*. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....*Cloth* 1.50
- ESPERANTO (World Language Series)**, *Prof. Mario A. Pei*. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc..... .25
- WORLD'S CHIEF LANGUAGES**, *Prof. Mario A. Pei*. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....*Cloth* 6.00
- AMERICAN POCKET DICTIONARY**, *Karl Froding*. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp..... .25
- EDINBURGH DICTIONARY**. Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....*Cloth* .85
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....*Cloth* 2.50
- FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**. Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....*Cloth* 2.35
- PLENA VORTARO DE ESPERANTO**, *Grosjean-Maupin*. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....*Cloth* 4.00
- Rare*, exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....*Cloth* 6.50
- FUNDAMENTA KRESTOMATIO**, *Zamenhof & others*. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....*Paper* 1.65
- Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....*Half-Cloth* 2.50
- KARLO**, *Edmond Privat*. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp... .25
- THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)**. The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....*Cloth* 2.50
- ESPERANTO SORTIMENTO**. Five books, good reading at low cost: *Akrobato de Nia Sinjorino*, legend of France, 25 pp; *Blanche-Virgulino de Lille*, medieval romance, 42 pp; *Lando de Arĝenta Akvo*, story of Far West, 48 pp; *Miserere*, music story, & *Thais*, by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; *Rozujo Ĉiumiljara*, the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only..... 1.00
- RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS**. Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection... 2.75
- INDIAN BEAD STAR**. Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch.. 1.00
- GREEN STAR PENDANT**. Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia... .75
- ENAMEL GREEN STAR**. Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch.. .65
- On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch... .65
- On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch.... .65
- . On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only..... .65

Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. NOW, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order NOW:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.